

4/2004

-kune-



Preparado al IS

26. Jahrgang, ISSN 0942-0576 und 11405

Die -kune- ist die Verbandszeitschrift der Deutschen Esperanto-Jugend e.V. und erscheint viermal jährlich. Ein Jahresabo kostet 15 Euro (Bestellung durch Überweisung auf das Beitragskonto der DEJ). Für Mitglieder der DEJ ist der Bezugspreis im Mitgliedsbeitrag enthalten. Erscheinungsweise: dreimonatlich, Anzeigenpreise auf Anfrage, Druckauflage: 700 Stück, Druckerei: Kirchhoff Druck-Anröchte

(Ĝ)IS - temo	04-05
IS - ĉeforganizanto	05-06
IS - ekskurso ktp.	06-07

vorwort

inhalt

03

25!

Saluton karaj legantoj!

Kune fariĝis 25 jarojn aĝa! La unua „gej-gazeto“ aperis en aŭtuno 1979. Legu pri la fondado kaj la unuaj jaroj sur paĝoj 12 – 15 (en la germana).

Okazis nia unua **kune-retbabilado**, kiun partoprenis:

unu usonano
unu braziliano
unu Ruso

mi kaj Robert Weemeyer. Fakte NENIU el la negermanoj konis kune ...
Do – ni trovis aliajn temojn interesajn.

Sekva kune-babilado ĉe ĝangalo okazos la **19an de Decembro** je la 17a horo (berlina tempo).

Ĉu jam frapis vian atenton, ke kune nun venas ĝustatempe? Al nia teamo aliĝis nova kunlaboranto. Kiu transprenis afable la dissendadon. Karulin' bonvenon!

Ne la unuan fojon kontribuas Aneta Ubik per kreativa atako. Dankon Aneta!
Kiu ŝatas diversajn artaĵojn kaj influojn de fremdaj kulturoj, legu pri mandaloj sur paĝoj 8 -11.

Mi deziras agrablan kristnasktempon

ĝIS via Stefa

Stefa

Karulin



kreativa atako	08-11
-kune- wird 25!	12-15
monocikla hokeo	16-17
Opinio	18-19
Esperanto trovaĝo	19
subtitolo	20-23
Aroma Jalto, EGE	24-25
Salomea	25
adreso	26-27

IS - Internacia Seminario

la bonkonata silvestra renkontiĝo en Germanio.
Kio atendas nin tio jaro?!

Ein Paar Gedanken zum diesjährigen IS-Thema -
Kulturelle Unterschiede - Probleme und Perspektiven

La ĉeforganizanto

Intervjuo kun la ĉeforganizanto
de IS – Martin B. Sawitzki,
kiu nuntempe laboras ĉe la
universitato en Budapeŝto.

Palma:

Ĉu estas pli malfacile organizi IS-
on el Hungario ol se vi estus en
Germanio?

Martin :



(Ĝ) Internacia Seminario

temo/ĉeforganizanto IS

05



Jeder Mensch ist anders.

Klar, aber wie versteht man das?
Na ja, ich bin klein und du bist
groß, ich mag Sahne und Tomaten
und dir wird davon schlecht,
ich schlafe ein im Zug und du
wirst reisekrank, ich bin vom
Herrn der Ringe fasziniert und du
findest es langweilig, ich spreche
Russisch und du Deutsch, wenn
die Deutschen sagen bei -10° ist
es richtig kalt und bei -15° eiskalt
- sage ich, die in Russland auf-
gewachsen ist: "Oh, Leute, und was
werdet ihr bei -30° sagen?"

Wir unterscheiden uns von ein-
ander durch unsere Gestalt, Spra-
che, Meinungen, Vorstellungen,
Nationalität und Kultur.
Gerade die eigene Kultur,
Traditionen und Bräuche, sowie
die Geschichte des eigenen
Landes prägen die Menschen.
Der Mensch ist ein kommunika-
tives Wesen, das Abwechslung
liebt, und deshalb macht es vielen
von uns großen Spaß, sich mit
Leuten aus anderen Ländern
- Ausländern - zu unterhalten.
Eine internationale Sprache gibt
es schon - ESPERANTO, damit
wurde das erste und größte Ver-
ständigungshindernis beseitigt.
Es gibt aber noch ein zweites:
Umgangsformen.
An diesem Punkt können auf-
grund der verschiedenen religio-
sen oder kulturellen Vorstellungen
Missverständnisse und Konflikte
auftreten .
Auf der anderen Seite kann man
sehr viel von Ausländern lernen,
z.B. wie sie mit Stress umge-
hen, oder wie sie verschiedene
Krankheiten heilen. Die Lehre wie

man Gegenstände und Möbel
in seinem Haus richtig plziert
- Fengshui, die Faustkampfkunst
Tai-Chi-Chuan, die Körper und
Geist in Einklang bringt, und
andere asiatische Kampfsport-
arten, aber auch Yoga finden in
Deutschland große Verbreitung.
Auch die Zusammenarbeit mit
ausländischen Kollegen oder der
Austausch verschiedener tech-
nischer und wissenschaftlicher
Errungenschaften zwischen den
Ländern tragen zu ihrer Entwick-
lung bei.
Trotz aller Unterschiede werden
wir Menschen immer auch etwas
Gemeinsames haben - die Gefüh-
le oder gemeinsame Interessen
wie: ich mag Esperanto und du
auch!
Wenn ihr mehr über das Thema
erfahren, euren Horizont erwei-
tern und neue Menschen kennen-
lernen möchtet, kommt einfach
zum IS 2004/2005!

eure U.T.
uljanat@yahoo.de

Ĝenerale ne. Estas kelkaj etaĵoj,
kiuj malfacilas el la foreco, sed
ĝenerale eblas organizi ĝin ankaŭ
de ĉi tie. La teamo komunikigas
ĉefe pere de nia retmesaĝlisto kaj
la vikio. Tion oni povas uzi de ĉiu
loko. Krome ekzistas telefono.
Sed ĉiam estis io neantaŭvidita.
Ĉi-foje ekz-e la foriro de
kelkaj bonaj teammembroj.
Krome ni devis alĝustigi la
partoprenregulojn por IS al la
deziroj de la Ministerio. Facilege
estis la serĉado de novaj
kunorganizantoj. Pasint-IS-e
membrigis multaj novuloj en la
teamo, pri kio mi ege ĝojas.

Palma :

Kiel statas la preparado de IS
nun? Je kia etapo vi estas? Kio
estas ankoraŭ farota?

Martin :

Komence de Oktobro la organiza
teamo renkontiĝis en Wetzlar por
pridiskuti la IS-on kaj renkonti kun
la estrino de la junulargastejo. Ni
jam kolektis 162 aliĝilojn.

Palma :

Ĉu taŭga ejo?

Martin : Jes. Ni estos en Wetzlar la kvaran fojon. La junulargastejo jam konas nin, la laborantoj tie estas festemaj, kaj ni travivas bonan kunlaboradon.

Palma : Ĝis!

Martin : Ĉu la memzorgantejo estos for de la ĉefa ejo?

Palma : Ĝis!

Martin : Szia.

Palma : Palma, kune@esperanto.de

Palma : das vin. Sed kompreneble tio ne estas la ĉefa kaŭzo, kial Mirjam kaj Stephan decidis ekskursi tien! La urbo (kies nomo ni bedaŭrinde ankoraŭ ne rajtas diri) estas la „ĉefurbo“ de la nevidantoj en Germanio, aŭ almenaŭ en Hesio. Kial? Troviĝas la Germana Studa Instituto por Nevidantoj tie. Vidante aŭ nevidante ĝoju kaj amuziĝu

lingvo jam gvidis ŝin ĝis Sibirio, Honkongo kaj Japanio. Amuziĝu kun la bonkora kaj feliĉa Mirjam, kiu krom Esperanto interalie parolas la germanan, anglan, francan, italan, japanan kaj katalunan lingvon! Stephan studas historion kaj la anglan lingvon en la heidelberga universitato. Krome li respondecas pri la elsendo

(Ĝ) Internacia Seminario

ekskurso ktp. IS

07

Pli for ol dum la lasta IS, sed atingebla piede post 10 minutoj.

Palma : Ĉu vi volis ion ŝanĝi - kompare al lastaj IS-oj?

Martin : Laŭ la spertoj el la pasinta IS ni ŝanĝis la koncepton de la programoj por novuloj kaj komencantoj. Kaj ni reformis la kotizan sistemon, kiu nun estas multli pli klara ol antaŭe.

Kion vi volas diri al la partoprenantoj?

Venu al IS!

Mirjam Walter kaj Stephan Mayer (**ekskurso kaj naĝposttagmezo**):

IS-partoprenantoj, ĝoju, ĉar vere vi havas du grandajn kialojn: unue la ekskurson kaj due la naĝposttagmezon.

Ni ekskursos al bela urbeto, kiu troviĝas en la proksimeco de Wetzlar. Ĝi kuŝas ĉe la sama rivero kiel la IS-urbo. Pro kio tiu urbo estas konata? Ĝi havas belajn konstruaĵojn kaj interesajn preĝejojn. Interalie la plej maljuna gotika preĝejo de Germanio aten-

kun Mirjam kaj Stephan! Ni aŭdis, ke okazos interesa programo tie: Unue vi povos partopreni urbogvidadon de lokaj esperantistoj. Poste atendos vin multaj surprizoj: botanika ĝardeno, romantika domo kun ekspozicio pri Hirthara Petro kaj mineralogia muzeo. Eble ankaŭ ni ekskursos kun vi al loka libera radio. La nomo de la urbo komeniĝas per 'm'. Nu, ĉu vi jam scias pri kiu urbo temas?

Kion fari dum pluva posttagmezo en Wetzlar? Ekzistas tre agrabla alternativo: naĝi en Laguno. Tio estas la nomo de la komforta kaj agrabla naĝejo en Aßlar, kiu estas urbeto apud Wetzlar. Ĝuu la naĝadon en la varma akvo kaj ignoru la pluvadon ĉirkaŭ vi!


Kiu gvidos vin? Mirjam kaj Stephan, du spertaj esperantistoj, okupiĝas pri la ekskurso. Mirjam jam kolektis multajn spertojn en Esperantujo. Ŝi eklernis Esperanton deksejaraĝe. Poste ŝi vojaĝis tra Eŭropo kaj Azio. La internacia

Esperanto.info en la libera radio Bermudafunk el Mannheim. Unu fojon en la monato venas interesaj informoj pri kaj parte en Esperanto. Multfoje kaj volonte li jam skribis artikolojn pri Esperanto en gazetoj. Krome li estas prezidanto de la Baden-Virtemberga Esperanto-junularo.

Stephan-HD@gmx.de,
Stelet013@yahoo.es



La TeatroTrupoTuluzo salutas la legantoj de kune kaj antaŭĝojas ludi por vi dum IS.
<http://esperanto.toulouse.free.fr/eo/TeatroTrupoTuluzo.php>



MANDALO

elparolu tiun vorton laŭte.
Ĝi sonas bele, ĉu ne?

Kreativa Atako

post-paŝa vojo al centro, supre menciita), la bildoj, pensoj kaj ideoj restos sub kontrolo. 'Sub kontrolo' signifas, ke tiujn bildojn, kiuj aperas el la subkonscio, vi vidas klare kaj restas trankvila, akceptas ilin, povas halti por pripensi kaj pentras plue laŭplaĉe.

Vidu, dum pentrado de mandaloj

Praktikaj konsiloj por la pentrado de mandaloj:

Estas grave, ke vi havu la emon pentri, ĉar nur tiel vi povos koncentri vian volon al la farota ago. Prenu al vi tempon, paperon kaj kolorajn skribilojn aŭ penikon kun akvaj koloroj. Se vi ŝatas, aŭskultu belajn melodiojn mallaŭte; silento ankaŭ povas esti

Mandalo

olsbnsM

La nomo 'Mandala' venas el la hinda lingvo kaj signifas 'cirklo'. Cirklo pro tio, ke oni, turniĝante, paŝante en spiralo, alvenas al centro. Mandalo estas bildo el simplaj geometriaj formoj, kiu daŭre estas tre populara en la hindaj religioj. Tie oni uzas mandalojn kiel helpon por meditado. La psikologo **C. G. Jung** substrekas, ke Mandaloj helpas al la vojo en la propran 'Mion'; al la individuigo de la personeco.

Eble vi jam aŭdis la jenan konsilon: "Ĉu vi malbone fartas? Ah, do kolorigu mandalon!" Ĝi fakte estas prava. Tamen estas utile **konscii**, ke ne temas pri simpla, stulteta kolorigado de kestetoj surpaperaj. Kian sencnon havus (kiel infanĝardeno infano) kolorigi formojn kaj tiamaniere adaptiĝi al strukturoj fiksjaj?

Vidu, ĉe mandalo-pentrado estas esenca **memorindaĵo**:

La pentranto koncentriĝu pri la centro de la pentraĵo. Ĉio kondukas al **la centro**, egale kiel li kolorigos (aŭ lasos malplena) la kesteton, ĝi havos influon pri la centro de la bildo. Simbole la pentranto **metu sin en la centron** de la mandalo. (Kial ne aldoni arbon? Aŭ sunon? Dependas de vi.) La homo paŝo post paŝo alproksimiĝas al la centro de la bildo – al la centro de si mem.


Tiamaniere la pentranto **pentras aktive** kaj ne senpense. Certe vi spertis, ke, kiam vi pentras, venas diversaj ideoj, pensoj aŭ bildoj en vian kapon. Ofte ili venas en neordigita formo, tro multaj samtempe kaj malaperantaj antaŭ via konscio, kvankam iu ideo povus esti grava. (Ni fakte estas tre kapablaj kaj havas bonegajn solvojn kaj ideojn. Kial ne doni al ili la ŝancon manifestiĝi? ☺. Tiel okazas, se vi pentras malaktive. Se vi pentras aktive (paŝo-


ofte okazas, ke oni sentas tensiojn malagrablajn, io malhelpas; la ago ne estas tiel 'harmonia' kiel homoj asertas... Atentu! La pentrado estas **vojo al harmonio** kaj ne la harmonio mem. Se vi sentas vin konfuzita pro streso, gravaj decidoj, manko de koncentrigxo ktp., ne pensu, ke, prenante penikon aŭ koloran skribilon en la manon, vi tuj estos ekvilibrata. La pentrado estas procezo. Ĝi estas terapio. Tio signifas, ke ĝi logike kondukas al la tensioj, al la fundo/kaŭzo de la problemoj por iom post iom glatigi ilin. Pro tio ne estas konsilinde komenci mandalon kaj lasi ĝin ne finita. Mandaloj estas kiel pontoj kondukantaj al bonfarto. La vojo ne ĉiam estas milda. Tamen la preta bildo povas haltigi la spiron pro sia beleco.

Kial ne kompari la mandalojn kun la naturo? Ĉu vi havas ideon? Kial ne pensi pri arbo. Certe, la ringoj en arboj estas mandaloj.

bela. [Post tiu artikolo troviĝas mandalo, prete konstruita por vi.]

Por pli individuaj mandaloj uzu cirkilion kaj liniilon – la produkto NE devas esti komplikita! La beleco kuŝas en la simpleco. Vidu la jenan ekzemplon, konstruitan el cirkloj, kvadratoj kaj trianguloj:





Belaj desegnoj ekestas, se vi elektas temon. Estu libera!


La tri simplaj formoj (cirklo, kvadrato kaj triangulo) havas simbolajn signifojn, kiuj dependas de la kulturoj.

Konkludante, ni komprenas ke mandaloj havas pli profundan sencion. Ili intencas kunigi kontraŭaĵojn kaj krei ligilojn. Tiamaniere ili funkcias kiel motoro por disvolviĝo (alfrontado de problemoj). Ŝajnas statikaj/nemoveblaj la desegnoj, sed ili tra aktiva pensado kaj kolorigado enhavas dinamikon.

Pro tio mandaloj povas influi la pentranton (aŭ observanton de preta mandalo – vidu la tibetajn mandalojn, mirakle belaj!) **trankviligante aŭ movante** la homon. Ankaŭ la psikologo C. G. Jung eltrovis, ke mandaloj donas sencion, direkton, esperon kaj la sencion de tuteco. Ili vekas scivolemon kaj sekve traboras

fiksajn pensstrukturojn en niaj mensoj. Aktive pentrante mandalojn, ni do povas ricevi iom de la spriteco kaj klarvideco de la infano – kiu ni daŭre estas.

Aneta Ubik
Aneta.Ubik@web.de




Mandalo

olsbnsM

En la orientaj kulturoj, ekzemple, la kvadrato estas simbolo por la tero. En la profundpsikologio (Tiefenpsychologie) ĝi signifas animan fortecon kaj stabilecon. En Tibeto ĝi estas signo pri templo, la sidejo de dio.

La cirklo estas ilo por centri la konscion, la anima energio kunigas en la centro. Tial la cirklo estas ankaŭ signo por la kosmo kaj la animo.

La triangulo kutime simbolas pli altan harmonion. Ĝi kunigas la pozitivan, la negativon kaj la neŭtralon. Ĝi montras la sintezon de la kontraŭoj.



-Kune- wird 25 Jahre alt.

Thomas Bormann gründete sie 1979 unter dem Titel *GEJ-gazeto*. Fünf Jahre, bis 1984, war er der Chefredakteur. Von 1984 bis 1988 war er Vorsitzender der Deutschen Esperanto-Jugend.

Franz Kruse, damals prezidanto, schrieb Artikel über Wichtiges aus dem Vorstand; Elisabeth Kuhl lieferte Infos über Treffen; und ich machte den Rest. Eigentlich gab es letztlich keine Redaktion, sondern die ganze Post lief bei mir zusammen; alle zwei Monate habe ich mich dann mit ein paar Aktiven getroffen, um an einem

Von 1979 bis 1982 haben wir die Zeitung im Esperanto-Centro Paderborn gemacht: Ich bin von Hamburg aus hingetrampt, Andreas Münchow von Hannover und andere Helfer kamen aus dem Ruhrgebiet.

Ich hab mich dort gleich auf den Composer gestürzt und Artikel geschrieben. Wenn ich dann eine

Mitteilungsblättchen ist, sondern sich auch als Forum für politische Diskussionen innerhalb der Esperanto-Bewegung anbietet, zum Beispiel für die Friedensbewegung. Damals, 1982, gingen ja Hunderttausende gegen neue Atomraketen auf die Straße, und in der *GEJ-gazeto* haben wir manchmal darüber diskutiert

To interview Bo

-kune-25

13



Heute ist er Ehrenmitglied.

Im Gespräch mit Stefanie Hanisch erzählt Thomas vom DEJ-Leben der frühen 80-er Jahre – ohne Internet und Handy –, von den Beziehungen zur DDR und seiner Beziehung zu Esperanto heute.

Stefa: Wie alt warst du, als du kune gemacht hast?

Thomas: Ich war 20 als die erste *GEJ-Gazeto* erschien, der *kune-Vorläufer*.

Ja, der Name war anders ...

...und führte früh zu Missverständnissen. Damals entwickelte sich gerade in der Esperanto-Bewegung eine Schwulenszene. Und als die hörten, jetzt gebe es eine „*GEJ-gazeto*“, waren die sehr begeistert. Später allerdings ernüchert, als sie merkten, dass *GEJ* auch eine Abkürzung ist und nicht nur der neologismo für „schwul“.

Wer war am Anfang dabei?

Wochenende die Zeitung zu machen: schreiben, teils abtippen, drucken, verschicken – oft im Tag-und-Nacht-Betrieb.

Abtippen, war das mit dem Composer?

Ja. Der *Composer* sah aus wie eine aufgeblasene Schreibmaschine und kostete rund 15.000 D-Mark! Zu bedienen wie eine Schreibmaschine, in Wirklichkeit aber eine höllisch kompliziertes mechanisches Gerät. Was man damit tippte, sah aus wie gesetzt für ein Buch, also sehr professionelles Schriftbild.

Ihr habt sicher auch viel telefoniert, oder?

Oh, wir haben viiiel telefoniert. Es gab ja noch keine E-Mails, keine SMS, nicht einmal Faxgeräte. Im Nachhinein kommt mir das steinzeitmäßig vor. Aber wir fühlten uns damals durchaus sehr modern.

Wo war das? In deiner Wohnung?

Seite fertig layoutet hatte, hab ich sie Andreas gegeben. Der hat im Nebenzimmer Matrizen draus gemacht und dann mit der Offset-Maschine drauflosgedruckt.

Wenn alle Seiten gedruckt waren, kamen die Helfer aus Burscheid und anderen Ortsgruppen des Ruhrgebiets zum Zuge. Wir haben zusammengelegt, gefaltet, geheftet, adressiert, einkuvertiert und frankiert, oft mit hübschen Sonderbriefmarken. Zum Schluss kam der Festmarsch zum Postamt: ab zum Versand.

Ab 1982 war's für mich einfacher: Da hatte die *GEJ* ihr Büro im Keller des Vereinslokals des Esperanto-Vereins Hamburg bezogen – unweit von meiner Wohnung. In Hamburg hieß unser Büro „*Hamburga Administra kaj Presa Servo*“, abgekürzt *HAPS*.

Warst du der Chef? Was wolltest du mit der GEJ-gazeto erreichen?

Sozusagen war ich der Chef, ja. Und ich wollte, dass die *GEJ-gazeto* nicht nur ein nettes

– aber in der *GEJ-gazeto* gab es auch viel Satirisches oder einfach Lustiges.

Habt ihr damals (1979–1984) auch versucht, die kune in die DDR zu verschicken? Gab's da Probleme?

Wenn ich mich richtig erinnere, haben wir immer auch ein Exemplar an die *JS de CLE* en *KL de GDR* geschickt, in der Charlottenstraße in Berlin-Mitte. Dieses typisch DDR-ische Abkürzungsmonster bedeutete: *Junulara Sekcio de Centra Laborrondo Esperanto en Kultur-Ligo de GDR*. Die Zeitung ist da wohl auch immer angekommen und brav archiviert worden, denke ich, aber sie wurde wohl nicht groß herumgereicht.

Ansonsten waren die Kontakte zu DDR-Esperantisten minimal, weil solche Kontakte von DDR-Seite behindert wurden. Aus der DDR durfte man auch erst 1989 zum *IS*.

Die Esperanto-Jugendtreffen in der DDR waren generell nur für

Teilnehmer aus „soclandoj“. Aus westlichen Ländern durfte man da gar nicht teilnehmen. Im Vergleich zu den anderen Ostblockländern war die DDR neben Rumänien und der Sowjetunion das strengste Land.

Einzige Ausnahme: Während der Leipziger Messe waren die Regeln nicht so streng. Da organi-

sonders?

Das beste war sicherlich der Text im verballhornten Esperanto (Karaĵo papo kaj mamoj! ... La mano de la koloro ŝtelis dumajn fragojn. ...) Wenn ich ehrlich bin - das lese ich heute manchmal noch einmal, weil's so schön war.

An was ich mich noch gerne erinnere: Die GEJ-gazeto war

peranto. Ich habe noch Kontakt zu einigen (inzwischen „alten“) Freunden aus meiner aktiven GEJ-Zeit. Esperanto heißt für mich vor allem noch: Wenn ich im Ausland bin, kann ich wirklich Land und Leute kennen lernen, und nicht nur die Sehenswürdigkeiten des Landes.

Eine schöne, abwechslungsreiche Arbeit.

Vielen Dank für das Interview und alles Gute für dich und deine Familie.

* Die FAME-Stiftung, ins Leben gerufen von Franz Alois Meiners, einem Esperantisten, verleiht alle zwei Jahre einen mit 5000 Euro dotierten

To interview Bo

-kune-25

15

sierten Espis in Leipzig immer ein Treffen, an dem auch Leute aus der „NSW“ (nicht-sozialistischen Welt) teilnehmen durften. Ich war drei oder vier Mal dabei. Es war sehr schön, hochinteressant, nette Leute, aber harte Sitten. Mit einem Kumpel hatte ich während eines solchen Treffens mal bei einem DDR-Espi-Freund privat übernachtet und nicht in dem offiziellen ejo. Der Freund hat später prompt Stress mit der Stasi gehabt.

Die GEJ-gazeto durften wir nicht nach Leipzig mitbringen, weil die DDR generell die Einfuhr von Zeitschriften „aus imperialistischen Staaten“ verboten hatte. Es war schon komisch damals. Die DDR war für uns GEJ-Leute damals eine sehr fremde, kaum zu verstehende Welt, viel weiter von uns entfernt als Holland, Belgien, Frankreich oder Italien. Aber das ist ja nun seit 15 Jahren Geschichte.

An was erinnerst du dich aus deiner Zeit als Redakteur be-

gerne brandaktuell. Einmal haben wir sogar die Offset-Maschine mit zum IS geschleppt und mitten unter den Teilnehmern die Zeitung gedruckt und fertig gemacht, und zwar am 29. Dezember 1983. Da haben wir dann sogar eine Wettervorhersage mit ins Blatt genommen, und zwar für den 30. Dezember 1983: 9 gradoj, pli da nuboj, foje pluvo. Nachts war die GEJ-gazeto fertig, in der diskejo haben wir gegen 3 Uhr die ersten Exemplare verteilt, beim Frühstück dann weitere Exemplare.

Bist du heute noch viel mit Esperanto beschäftigt? Hast du viel Kontakt zu Esperantisten? Was bedeutet Esperanto für dich?

Ich mache durchaus noch Esperanto, wenn auch nicht so superaktiv. In den letzten Wochen habe ich geholfen, die Verleihung des Esperanto-Kulturpreises der FAME-Stiftung* über die Bühne zu bringen.

Außerdem spiele ich sehr sporadisch noch Theater auf Es-

Was machst du heute?

In erster Linie habe ich Familie: mit zwei kleinen Söhnen. Beruflich hat mich auch die GEJ-gazeto-Zeit in den Journalismus reingehievt. Ich arbeite in der Aktuell-Redaktion des Radiosenders SWR 1 (Südwestrundfunk).

Preis an Leute oder Gruppen, die sich in der Esperanto-Kultur besonders hervor getan haben.

Stefa Hanisch, kune@esperanto.de

kaj nun venos...



Surgrimpi de malantaŭe, rigardi rekten kaj premi sin teren en la selo

–ek!

La unuan horon vi verŝajne ankorau tenos vin ĉe muro, balustrado aŭ barilo ĝis vi – pli-malpli – kapablas rekten veturi.

„Por priskibi la senton, kiun oni

Ĉe „Circulum“ en Berlino trejnas sin jonglistoj, akrobatoj kaj monociklaj hokeistoj.

Monocikla hokeo?! Kio estas tio? Hokeo sur monociklo?

„Ne, tiu sentuŝa teama sporto similas pli al glacia hokeo kaj estas ludata per glacihokeaj bastonoj“, diras Timo, ankaŭ membro de la

En Germanio ekzistas 40 teamoj. Ĉar monocikla hokeo estas – simile al Esperanto – pli-malpli ekzotika hobbio, viroj kaj virinoj de ĉiuj aĝoj ludas komune en la amatoraj teamoj.

„Monocikli ĉiu povas lerni! Vizitu niajn trejnadajn, provu, vi ne nepre devas tuj membriĝi“, diras Andreas.

Kion vi bezonas por ludi monociklan hokeon:

- rakedon cx. 10 €
- monociklon cx. 50 €
- malnova tennispilko (malnova, cxar gxi ne plu saltas)
- gantoj
- genuprotektiloj

Monocikla hokeo

Monocikla hokeo

17

havas monociklante, oni devas scii, ke ĉe monociklo ekzistas nek pedalbremso, nek malkluĉilo. Se vi ĉesas pedali, vi haltas.

Do oni devas pedali ankaŭ MALSUPREN“, klarigas Andreas – membro de asocio “Circulum”.

asocio.

Dum la 2oble 10-minuta ludo interbatalas po 5 teamanoj, kaj oni ne havas fiksan golulon.

Oni konas tiun relative novan sporton en Japanio, Svislando kaj Usono.

Dum la ludado gravas antaŭ ĉio ekvilibro, lerteco kaj forto. Oni ludas en gimnastikejoj. Monociklistoj ŝajne ne apartenas al iu certa speco de homoj. Ekzistas riĉaj, malriĉaj, doktoroj kaj murfarbistoj, kiujn unuiĝas nur la sporto.

Surstrate nur tre malmultaj uzas siajn monociklojn: ĉar ĝi ne havas du sendependajn bremsojn nek lampon aŭ sonorilon, la monociklo en Germanio apartenas al „ludiloj kaj sportiloj“ kaj devas esti uzata nur sur la trotuaro.

Esceptoj ekzistas: Petra partoprenis monociklante la lastan düsseldorfaran maratonon kaj bezonis por tio 2 horojn 36.

Se vi volas ekscii pli pri monociklo – ekzemple la lokon de Circulum Berlin, vizitu la hejmpaĝon www.einradhockeyliga.de.

Via Palma kune@esperanto.de



ĈU MI DEVAS SUBTENI LA ESPERANTO-PARTION?

Ĉe la lastaj eŭropaj balotoj kandidatis – unuope je tiu skalo – partio, inter kies celoj troviĝas interalie la Lingvo Internacia: la partio “Europo-Demokratio-Esperanto” (EDE, www.e-d-e.org).

tiu aspekto la hodiaŭa realeco malpravigas la iniciatinton, d-ron Zamenhof kaj liajn kvazaŭreligiajn konceptojn). Kaj certe ne kiel fundamento de politika partio.

Cetere kaj konsekvence, Esperantistoj apartenas al diversaj malsamegaj politikaj ideologioj, kaj kutime tamen ĉiu

kaj tro politika por esti trakata je tia nivelo. Dubindas ĉu partio kiu – laŭ memdifino – laboras por “Eŭropo sendependa de la influo de USONO, ĝia lingvo kaj ĝia kulturo”, kaj kiu anstataŭigas politikan programon per la deklaro, ke “por la aliaj demandoj faritaj al la eŭropa parlamento dum tiu elektoperiodo, la

al la antaŭbalota kampanjo precipe en Francio oni informis multajn homojn pri Esperanto, kaj probable kelkaj inter ili eĉ lernos ĝin. Sed ĉu por tio celo oni nepre uzu politikon?

Se ni volas profunde kaj daŭre influi la politikan sistemon, ni ne forkuru en virtualajn mondojn,

OpinioEDE

trovaĵo Esperanto

19

e.org). Multaj esperantistoj dediĉis energion kaj tempon al la laboro por tiu projekto; ili kolektis subskribojn por subteni la apogon de la partio, kunlaboris je la administra flanko aŭ eĉ mem kandidatis sur loka listo de EDE.

La kandidateco de EDE levis plurajn esperojn kaj demandojn. Ĉu finfine aperis projekto por enigi Esperanton en la eŭropan politikan diskurson? Ĉu konsekvence Esperantistoj devus nepre subteni la partion EDE?

Mi pensas ke ne, kaj ke pro pluraj kialoj nek EDE nek iu alia novfondota “Esperanto-partio” montras la ĝustan vojon. Unue kaj ĉefe pro la lingvo mem. Esperanto estas idearo, kiu komprenas la lingvon kiel komunikilon kaj certan aron de valoroj: reciprokan respekton, intereson por aliaj kulturoj, rifuzon de naciismo kaj etnaj egoismoj. Sed Esperanto ne taŭgas kiel ideologio, kiu kovru ĉiujn problemojn de la vivo (En

trovas ligan inter sia ideologio kaj Esperanto. Ekzistas komunismaj Esperantistoj, kiuj esperas, ke la tutmonda revolucio eku dank’ al la Lingvo Internacia; katolikoj, kiuj vidas en Esperanto la “Novan latinon de la eklezio”; merkatemuloj, kiuj revas pri la ideala justa tutmonda merkato kaj kredas, ke ĝi realiĝus – dank’ al Esperanto. Kaj ekzistas Esperantistoj, kiuj estas konvinkitaj, ke per la lingvo kaj ĝiaj idealoj ili kontribuos al la plibonigo de la mondo, sed nepre ekster la kampo de politiko. Prave, ni argumentas, ke la diverseco (ankaŭ la politikopinia) de la Esperanto-movado estas unu el ĝiaj plej fortaj kaj fascinaj aspektoj. Sed, same, ĝi montras, kiel absurda estas politika Esperanto-partio.

Ofte oni riproĉas al la “subten-rifuzantoj”, ke ili preferas disigi sian “Esperanto-mondon” de la vera kaj fuĝas el la realeco en Esperanton. Mi pensas ke male, Esperanto estas tro reala

universalaj deklaraĵoj de homaj rajtoj kaj eŭropaj civitanoj kaj infanoj estos nia gvidilo” (ambaŭ citaĵoj el la retejo www.e-d-e.org) estas ekzemplo por la taŭgeco kaj seriozece de Esperanto je internacia nivelo. Certe, dank’


sed eniru la veran. Politikaj partioj de ĉiuj flankoj jam atendas nian kontribuon, kvankam plej ofte ankoraŭ nekonscie.

Gregor Hinker,
gregor.hinker@esperanto.at

Esperanto trovaĵo #6

Ĉu Esperantaĵo? Ĉu miaj okuloj nur vidas fatamorganon?

Ĉie estas Esperanto!



Kiel Esperantigi vian ŝatatan filmon?



Ĉu al vi iam venis la penso: “Jen estas bona filmo. Ĝi havas multajn spicajn kaj tuŝajn momentojn. Sed ĝi bedaŭrinde akireblas nur en la rusa (germana, franca, angla). Estus bone, se ankaŭ Esperante

ardan disputon kun tronuancigo de malgravaj aferoj. Tial pri la sekvaj filmoj la grupo jam ekfunkciis alimaniere: restis nur plej spertaj tradukantoj, kaj unu filmo estis tradukata nur de unu homo, kiu tradukas laŭeble kaj la paroladon, kaj la kantojn. Poste alia, egalsperta homo, provlegas la tradukon kaj

2.1 Kiel oni povas konverti filmon el lumdiskego al video-formato? Ĉiuj niaj subtitoligitaj filmoj estas en tiel nomata DivX-formato, kio signifas, ke ili havas la kvaliton de lumdiskego (DVD), sed estas kunpremitaj ĝis la grandeco de unu lumdisko. Por tio, se vi havas vian ŝatatan filmon en lumdiskego kaj volas nepre subtitoli ĝin,

1) oni povas elŝuti jam pretajn subtitolojn de specialaj paĝaroj. (La plej rekomendindaj estas <http://www.subtitles.ro/> kaj <http://www.script-o-rama.com/> . Por germanoj estas interesa ankaŭ la paĝaro <http://subtitles.de/> .) La malavantaĝoj estas, ke * la frazoj plejparte estas mallongigitaj kaj foje eĉ plene



Subtitoloj

subtitoloj

21



oni povus ĝin ĝui”. Ĝuste ĉe tiu demando fondiĝis nia grupo, kiu okupiĝis pri Esperantigo de kelkaj famaj rusaj filmoj, kiujn oni montris dum ĉi-jara IJK. La unuaj demandoj, ĉu eblas (teknike kaj metode) traduki kelkajn plej famajn E-filmojn, aperis unue en la Esperantoforumo <http://www.e-novosti.info/forumo/index.php>. Sufiĉe baldaŭ estis lanĉita aparta projekto pri tradukado de la unua proponita filmo “Ordinara Miraklo”.

1. Kiel estas organizita la traduklaboro?

Komence ni varbis por plej multe da volontuloj, kiuj pretis traduki rusajn subtitolojn, prenitajn de senpaga subtitolpaĝaro. Sed baldaŭ montriĝis, ke komuna volontula laboro de multaj tradukantoj kun tre malsamaj niveloj estas malfacila kaj peniga afero: oni devis multe korekti la tradukojn kaj la rezulta teksto estis tre buntstila. Krome, ofte la traduko de kelkaj frazoj kaŭzis

esprimas sian opinion, ĉu indas ion korekti aŭ aldoni. Post fina interkonsento inter la tradukanto kaj provleganto la subtitolojn oni pludonas al la teknikistoj. Tia labordistribuo, kompreneble, postulas pli da laboro de unuopaj homoj kaj sufiĉe altan nivelon de la tradukantoj, sed havas la tre grandan avantaĝon, ke la rezultanta kvalito estas kutime alta.

Aparte de la traduko, aliaj fakuloj okupiĝas pri kompilado de lumdiskoj kaj skribas skriptojn por ĝuste enmeti la Esperantotiparon en la sistemon kaj lanĉi la filmon. Kroma homo pretigas belajn kaj arte produktitajn kovrilojn. La grupo havas kaj la retliston (<http://www.yahogroups.com/rffi>) kaj la subforumon en la ĉefa forumo. Sed kiel montras la sperto, ilin oni uzas por demandi ion samtempe de ĉiuj homoj. Por rutina traduklaboro tiuj eĉ ne estas nepre bezonataj.

2. Kiel produkti lumdiskon kun ĝuste subtitolita filmo?

ankaŭ vi devas konverti la filmon al tiu formato.

Por “haki” lumdiskegon oni uzas kelkajn duonlaŭleĝajn programojn: DVD Decrypter, DVD2AVI, VFAPICnv kaj VirtualDub. Ili ĉiuj estas troveblaj en la reto, kelkaj jam eĉ kune kun la “hakiloj”.

La sinsekvo de agoj estas jena: komence kopii la vid- kaj aŭd-dosierojn el la lumdiskego al via durdisko, ekstraktu bezonatajn por vi trakojn kaj kuntiru ilin en unu aŭd-vidan dosieron. Por tio oni bezonas sufiĉe fortan komputilon kaj cx. 4 Gb de libera spaco sur durdisko. Se vi tamen volas uzi viajn subtitolojn en lumdiskego, vi povas uzi jenajn programojn: <http://www.digital-digest.com/dvd/downloads/showcategory.php?cid=11>

2.2. Kiel oni povas akiri subtitolojn? Kia estas ties formato?

Ekzistas du vojoj por akiri subtitolojn:

kripligitaj; * la apertempo de la subtitoloj ne ĉiam ĝuste koincidas kun la filmo; pro tio oni tamen devas (iom) prilabori la subtitolojn kaj ĝustigi la tempojn de ĉiu aparta filmo.

2) oni povas spektante la filmon mem entajpi la subtitolojn. Tiu metodo estas pli laborpostula, sed ankaŭ pli fidinda. La subtitolojn oni konservas kiel dosieron en la formato .txt, .sub aŭ .srt kaj redaktas en ajna teksta redaktilo.

La formato estas jena:

12	ekrannumero
00:01:12,500 --> 00:01:14,000	la tempintervalo
	por montri la subtitolojn
Teksto	la montrata
teksto	unu malplena
	linio (por distingigi de la sekva)

La tempintervalo estas indikita per komenca kaj fina tempo en la formato: horo:minuto:sekundo,sekundono. La ekrannumero vere ne tiel





gravas, la ludilo ĉiam legas la subtitolojn dekomence kaj uzas la tempinkojn por montri la subtitolojn.
La teksto de la subtitoloj devas okupi ne pli, ol 2-3 liniojn, ĉar ne ĉiuj subtitolmontriloj povas montri plurliniajn subtitolojn kaj oni malfacile povas vidi la bildon.

La tiparon eblas trovi ekzemple ĉi tie: <http://jeff.cs.mcgill.ca/~luc/esperanto.html>.
Por instali la tiparon en la sistemon sufiĉas simple kopii ĝin en la dosierujon "Windows/Fonts".

2.4. Per kiuj programoj mi povas montri subtitolojn samtempe kun filmo? Kie akiri tiujn programojn?

3. Mallonga vortaro por homoj, kiuj produktas subtitolojn.
Scenaristo, (ĉef)reĝisoro, (ĉef)kameraisto, (ĉef)pentristo, komponisto, sonreĝisoro, ŝminkisto, muntisto, kostumisto, specialaj efektoj, redaktisto, konsilanto, produktinto (ĉefrespondeculo).

kontribus sekvaj homoj:
°[Hamstro] () – helpis traduki „Ordinara Miraklo“ kaj malnete tradukis „Blanka Dezerta Suno“
°[Ulmo] (Moskvo) – helpis traduki „Ordinara Miraklo“

5. Jam aperintaj filmoj.

Ni jam tradukis 5 filmojn:
1) Ordinara Miraklo (2 KDoj)



Subtitoloj

subtitoloj 23



Jen estas ekzemplo el nia lasta tradukita filmo:

19
00:02:27,600 --> 00:02:30,000
lokoj por pasaĝeroj kun infanoj kaj por handicapuloj

20
00:02:38,800 --> 00:02:42,200
- Sidiĝu, karulino.
- Ne, dankon, restu sidanta.

2.3. Kiel ĝuste trakti Esperantajn literojn? Kie oni povas trovi Esperantotiparon? Kiel ĝuste instali la tiparon en la sistemon?

Kvankam BSEPlayer laŭaserte kapablas montri unikodajn simbolojn, ni ne sukcesis ekfunkciigi tion. Pro tio ni uzis specialan Esperantotiparon, kiun ni instalas en la sistemon. Ekzistas multaj Esperantotiparoj, kiuj plejparte havas verajn ĉapelitajn literojn anstataŭ neuzataj en E simboloj "q", "w" ktp. Tamen en ĉiu nia lumdisko estas troveblaj ankaŭ la subtitoloj en Unikodo kaj X-skribo.

La plej popularaj du programoj por montri subtitolitajn filmojn estas Light Alloy (<http://www.softella.com/la/index.ru.htm>) kaj BSPlayer (<http://www.bsplayer.org/>). La lasta estas preferata, ĉar ĝi havas interfacon tradukitan al Esperanto.
En ajna okazo oni uzas du dosierojn: la filmon en MPEG-formato kaj simple enŝalteblajn subtitolojn, kiujn oni legas de aparta .srt- aŭ .txt-dosiero.

2.5. Skripto por ĝusta instalo de tiparo kaj lanĉo de filmo kun subtitoloj.

La skripto, kiu instalas la tiparon en la sistemon kaj aŭtomate lanĉas la ludilon, estas kutima Vindoza .bat-dosiero, kiu havas du liniojn:
copy tiparnomo %windir%\fonts\ tiparnomo
start "ludilo subtitoloj"
Se oni bezonas pli intelektan skripton, oni povas uzi la programon SOMScript.

4. Personaro de nia grupo.
La kerno de la grupo, kiu okupiĝas pri produkto (sed ne distribuo!) de la lumdiskoj kun Esperantaj subtitoloj, konsistas nur el 4 homoj. Preskaŭ ĉiu homo okupiĝas pri kelkaj aferoj: tradukas, korektlegas, teknike helpas, sed tamen la ĉefa labordistribuo estas jena (alfabeta ordo):

°Aleksandr Galkin [Alaŭdo] (Berlin) – traduko de filmoj kaj prov- kaj korektlegado.
°Maksim Grisxin [Gardi] (Moskvo) – produkto de arta presita kovrilo por filmoj, bruligado de lumdiskoj kun filmoj.
°Jelena Koval [Monedido] (Moskvo) – entajpo kaj prilaboro de originaj subtitoloj, kreo de teknika parto al la subtitoloj, kreo de skriptaro por ĝusta instalo de tiparo kaj lanĉo de filmo.
°Pavel Mojxaev [Mevo] (Simferopol) – traduko de filmoj, prov- kaj korektlegado.

Krome, komence al la traduko

2) Diamanta Brako
3) Ivan Vasiljeviĉ ŝanĝas la profesion.
4) Blanka dezerta suno.
5) Magia Lampo de Aladdino.

La filmoj baldaŭ aĉeteblos en la libroservo de EsperantoLand.de.

6. Niaj estontaj (napoleonecaj) planoj.

Ĝus hieraŭ ni tradukis sekvan filmon "Operaco Ŭ". Baldaŭ ĝi aperos kiel lumdisko kaj estos montrata dum la Novembra Esperanto-festivalo "StRIGo-10", kiu okazos en Nijxnij Novgorod de la 5-a gxis la 8-a de Novembro 2004 (<http://www.e-novosti.info/forumo/viewtopic.php?t=1115>)
Dume ni prilaboras la faman rusan filmon "Magiistoj".

Rusa Filmtraduka Teamo.
<http://www.yahogroups.com/rffiret>



AROMA JALTO

La 17-a Esperanto-festivalo
La 1-a informletero.

Jalto printempe estas io eksterordinara. Vekiĝanta montaro, verdĝanta arbaro, freŝaj herboj, aromoj de floroj kaj senlima blua Nigra maro. Muĝo de ondoj, forkurantaj al horizonto, varmaj ŝtonoj kaj printempa karesa suno,

INTERKULTURO;
lingvaj diversgradaj kursoj;
Universitato; lingva prezentado;
ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj;
KGS; ludoj.
Lingva ordo - tradicie severa.
Nulaj komencantoj ne estas akceptataj.
Dum la registrado Vi devas respondi al simplaj demandoj.

Aleksandra Gricenok, Kijiv - lingva prezentado, adiaua balo, informtambulo;
Vjačeslav Katin, Jalto - piedmarŝoj, lokaj zorgoj;
Miaail danov, Jalto - ornamado, artaĵoj;
Jelena Snigirjova, Jalto - ekskursoj.

adreso: p.k.35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio.
Telefono: (044)295 1701
Retpoŝto: volodimir_h@ukr.net
Retpaĝo: www.aromajalta.by.ru
La duan informleteron ricevos aliĝintoj.

Bonvenon E-parolantoj!

La aliĝilon kaj aliĝkotizon bonvolu sendi al Volodimir HORDIJENKO ghis la 1-a de marto, 2005 al la

Aroma Jalto informoj

informoj EGE

25

varmiganta animon kaj koron.
Jalto printempe estas la renkontiĝo de geamikoj, kiujn kunligas komuna lingvo, similaj intereso kaj frateca etoso.
Jalto printempe estas paradizo sur Tero, kiu vizitendas, almenaŭ Unufoje dum la vivo.

Loko. Krimeo, Jalto - la plej populara kaj fama kuracloko de Ukrainio
Tempo. 30.04 - 09.05.2005.
Loĝado: En 2-litaj ĉambroj kun lavabo, necesejo kaj duŝejo, kontraŭ 6 EUR diurne.
En 3-litaj ĉambroj kun lavabo, necesejo kaj duŝejo, kontraŭ 5 EUR diurne.
En 4-litaj ĉambroj kun lavabo kaj necesejo, kontraŭ 4 EUR diurne.
En 5-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, kontraŭ 3 EUR diurne.
Loĝado ne estas ebla sen nutrado.
Nutrado: En la sama ripozejo, kontraŭ 3,5 EUR 3-foja.

Programo: Seminarioj por Esperanto-instruantoj; seminario de

Aliĝkotizo (unue Aliĝkategorio ĝis la 1-a de marto, due 2005 surloke):
UkrEA-membroj 4€, 6€
Ekssovetio, inkluzive ukrainanoj 6€, 10€
B-landoj 10€, 15€
A-landoj 15€, 30€

Kontribuantoj al la programo havas rabaton lau interkonsento.

La organiza komitato
Volodimir Hordijenko, Kijiv - ĉeforganizanto, loĝado, financoj, sportaj aranĝoj;
Atilio ORELLANA ROJAS, Den Haag - seminario por Esperanto-instruantoj;
Ilona Koutny, Poznan - instruado por perfektiga grupo, Universitato;
Ole Pokotilo, Kijiv - instruado por paroliga grupo; verda polico; Universitato;
Anna Dubrovina, Kijiv - instruado por komencanta grupo;
Aleksandro Koval, Gomel - aktualigo de la retpaĝo, koncertaj programeroj, Universitato;
Ana Montesinos, London - Universitato, lingva prezentado.
Katerina Semjonova, Berdjansk - interkona vespero, KGS;

Esperanto-Grupo Essen (EGE)

Esperanto-Schnuppern und Neu-Einsteigen für Interessierte

Um Neu-Interessierten einen ersten Kontakt mit der neutralen Sprache Esperanto zu ermöglichen, bietet die Gruppe ab November besondere Treffen für Anfänger und Neuinteressierte an.
Es werden leichte Sprech-, Lese- und Hörübungen sein, bei denen die Neuinteressierten und Anfänger Kontakt mit der Sprache erleben können.
Auch Einblicke in die Geschichte der über 115 Jahre jungen Sprache Esperanto werden dort gegeben.

Jeder Treff-Abend wird eine in sich geschlossene Einheit sein. Die Treffen werden keinen fortlaufenden Sprachkurs haben - somit ist eine Teilnahme jederzeit möglich. Auch regelmäßiges Erscheinen ist nicht unbedingt notwendig.

Die Neu-Interessierten-Treffen bilden keinen Ersatz für die Esperanto-Anfängerkurse der Esperanto-Gruppe Essen. Diese werden weiterhin organisiert.
Zusätzlich zu den Neu-Interessierten-Treffen finden weiterhin zwei Mal pro Monat die Zusammenkünfte der Sprecher und Sprecherinnen statt. Hier steht die Anwendung der internationalen Sprache Esperanto im Mittelpunkt.

Nachfragen bei Fred Hey, Tel: 0201-5450032

Bundesgeschäftsstelle (BerO)

Einbecker Str. 36, 10317 Berlin, Tel./
Fax.: (0 30) 42 85 78 99,
E-Mail: bero@esperanto.de,
weitere Infos unter:
<http://www.esperanto.de/dej/bero.htm>

DEJ-Mitgliederverwaltung

Sabina Nedl, Rushaimerstr. 10, 80689
München
E-Mail: gej.ma@esperanto.de

Internationale Beziehungen

Anna-Laura Wickström,
c/o Deutsche Esperanto-Jugend, Ein-
becker Straße 36, 10317 Berlin,
E-Mail: gej.kir@esperanto.de

kune

Stefa Hanisch, Einbecker Str. 36,
10317 Berlin
E-mail: kune@esperanto.de

Mitgliedschaft betreffen (Adress-ände-
rungen u.ä.), bitte direkt an das BerO
(Adresse siehe oben).

Kategorie A (Jahrgang 1978-87):

- Schüler, Studenten, Azubis, Zivil-
oder Wehrdienstleistende, Arbeitslose
15 Euro
- Jugendliche mit Einkommen 30E

Kategorie B (ab 1988): 8 E

Spenden

(genauso wie die Mitgliedsbeiträge)
an die DEJ sind steuerlich abzugs-
fähig. Die Bankverbindung findest du
oben.

Mitgliederwerbepremien, Habt
ihr schon mal gemerkt, dass euer
Geldbeutel genauso leer ist
wie die Mitgliederliste? Also wollen

adressen

dej-intern

27

Vorsitz

Felix Zesch, Adenauerring 2//B8,
76131 Karlsruhe, Tel.: (01 79) 7 50
00 53,
E-Mail: gej.prezidanto@esperanto.de

Unterorganisationen

Julia Noe, Katharinenstr. 4, 69-321,
70182 Stuttgart,
Tel.: (07 11) 6 20 91 21,
E-Mail: gej.kola@esperanto.de

Veranstaltungen

Martin Sawitzki, Max-Planck-Ring 8d,
Wg. 56, 98693 Ilmenau
Tel.: (0 36 77) 4 44 50 5,
E-Mail: gej.kkren@esperanto.de

Finanzen

Anna Posingies, Danziger Str. 68,
10435 Berlin,
E-Mail: gej.kasko@esperanto.de

Subventionen

Andreas Diemel, Buderusstr. 3, 4507
Essen, Tel.: (0201)4787202, E-Mail:
gej.supo@esperanto.de

Öffentlichkeitsarbeit

Isabel Frey, Innsbruckstr.69, 79111
Freiburg, Tel.: 0761/4575648, E-Mail:
gej.kapri@yahoo.de

Deutscher Esperanto-Bund

(DEB), Immentalstr. 3, 79104 Frei-
burg, Tel.: (07 61) 28 92 99,
Fax: (07 61) 28 92 96,
E-Mail: GEA@esperanto.de

Bücherdienst des DEB,

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-
Seeger-Str.
9, 55129 Mainz, Tel./Fax: (0 61 36)
4 62 32 (abends), E-Mail: wolfgang.schwanzer@esperanto.de

Deutsche Esperanto-Bibliothek

Torhaus, Gmünder Torplatz, 73430
Aalen, Tel. (0 73 61) 52 - 25 85 od.
52 - 25 80

junularo esperanta svislanda

Postfach 3324, CH-4002 Basel,
Schweiz, E-Mail: jes@skol.ch

Österreichische Esperanto-Jugend

Postfach 804, A-8011 Graz
E-Mail: aej@esperanto.at
<http://aej.esperanto.at/>

DEJ-Mitgliedsbeiträge 2004

Bitte beachtet: Alle Beiträge sind zum
Jahresbeginn bzw. zum Beitrittszeit-
punkt auf das angegebene Konto
zu überweisen. Zuschriften, die die

Förderer

(freiwilliger Beitrag, jeweils mind.)
ohne Einkommen 15 Euro
mit Einkommen 30 Euro

P-Förderer

freiwilliger Beitrag mind. 50 Euro

Bankverbindung

Bank für Sozialwirtschaft Hannover
(BLZ 251 205 10), Kto.-Nr.: 8424901
(Beiträge, Spenden, Abos) oder
8424900 (für Treffen)

Internet

www.esperanto.de/dej. Hier ist die
DEJ mit ihren Internet-Seiten präsent.
Hier sind aktuelle Infos und viele
Hintergrundnachrichten über unsere
Arbeit und andere Esperanto-
Aktivitäten leicht zugänglich.
Wir bieten auch eine
Esperanto-E-Mail-Adresse (z.B. in der
Form Gabi.Mustermann@esperanto.de)
für nur 3 E. pro Jahr an. Auf diese
Eo-Adresse eingehende Nachrichten
werden an deine Haupt-E-Mail-
Adresse automatisch weitergeleitet.
Eine tolle Möglichkeit, unauffällig auf
Esperanto aufmerksam zu machen.
Infos bei:
Steffen.Pietsch@esperanto.de

wir beides füllen. Für jedes C-Mit-
glied, das ihr bis Ende 2004 werbt,
bekommt ihr 0,50 E , für jedes A-, B-,
F- und P- Mitglied (auch weiterhin)
bekommt ihr euren kompletten
Jahresbeitrag erstattet.

Grüner Draht (Verda Lineo)

Hast du den Akkusativ vergessen?
Was heißt „Esperanto“ eigentlich auf
Deutsch?
Ein DEJ-Service: Der Grüne Draht
(Verda Lineo) unter
Verda-Lineo@esperanto.de

Treffen

Eine kleine Auswahl, und weiterfüh-
rende links findet ihr auf:
<http://www.esperanto.de/dej/renkont.htm>

Die Jahreshauptversammlung der
EJNRW findet auf dem IS 2004/2005
in Wetzlar statt. Zeit- und Treffpunkt
werden vorort bekannt gegeben.